

ANĜELETOJ NEGRAJ

A. Eloy Blanco/M. Alvarez Maciste
Esperantigo: Emanuele Rovere

Pentristo, paŭzigu l'laboron, dum vi pentradas l'altaron.

Mi estas nur povra nigrulo, venas kun eta postulo:

kvankam la Dipatrino blankas, pentru anĝeleton negran.

Ĉiuj beboj ĉielen iras, eĉ se haŭt' ilia nigras.

Se vi pentradas kun amsento,

la koloro nigra por vi ne estu honto.

Vidante bebojn negrajn, al ili Dio ridetos.

Mi estas nur negro, pekulo, tamen de Dio fidelulo.

Scias mi, ke Li amas Siajn filiojn, same negrojn kaj blankulojn.

Kvankam la Madono blankas, pentru anĝeleton negran.

Ĉiuj beboj ĉielen iras, eĉ se haŭt' ilia nigras.

Se vi pentradas kun amsento,

la koloro nigra por vi ne estu honto.

Vidante bebojn negrajn, al ili Dio ridetos.

Mi estas nur negro, pekulo, tamen de Dio fidelulo.

Petas mi, ke vi, en anguleton, pentru negran anĝeleton.